

Mensuel
Numéro 68
Octobre 2010

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto:
vers une culture sociale sans frontières*

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €

Gravaj manifestacioj ĉi somere, ĉie en Francio interalie La 4an de Septembro 2010 : kontraŭ ksenofobio

*Kion oni fine riproĉas al mi ?
Ĉu, ke mi ne atendis aŭtunon,
por malfermi la ĉas-periodon ?*



Vidu p. 14-15, opinion de partopreninto en Parizo.

Flore kuku ! Aŭtuna kuko

Ŝaltu la fornon je 200 °C.


Miksu unue la buteron, la faronon kaj la sukeron ĝis sabla aspekto. Aldonu la ĉokoladon kaj bone miksu. Lavu kaj senŝeligu la pirojn kaj la ananason; tranĉu ĉiujn fruktojn en pecetojn kaj metu ilin je la fundo de la plado. Aldonu la paston sur la fruktoj.

Lasu en la forno 30 minutojn proksimume, kiam la supra parto estas orkolora, la kuko estas pret!

Preparado: 20 min
Kuirado: 30 min

100 g da mola butero
200 g da faruno
200 g da ĉokolado en pecetoj
50 g da nuksoj
2 piroj
2 bananoj
½ ananaso
120 g da sekaj abrikotoj

Flora Markov



Kursoj - Staĝoj

San-Briego (22)

Esperanto 22 (Côtes d'Armor)
Bretonio

Esperanta semajnfino

de la 11a (14H) ĝis la 12-a (17H) de Decembro 2010
Auberge de Jeunesse de St Briec
Manoir de la Ville Guyaumard
Les Villages
22000 Saint Briec

Povas ja esti al pluraj bona projekto, dum semajnfino en San-Briego (Bretonio), en luda etoso, sekvi esperantajn kursojn kun:

- * Petra SMIDELIUSZ (Hungario), kiu instruos al komencantoj
- * Jean-Luc KRISTOS (Francio), kiu, en 2agrada kurso, uzos diversajn novajn ludojn
- * Serge SIRE (Francio) kiu trejnos per improvizado, tuja traduko, ktp... al la tria-niveluloj.

Jam nun eblas rezervi apud :

Franjo LEVEQUE
(Esperanto 22)
09 53 92 77 37
leveque.franjo@gmail.com



Agajo (83)

Mediterranea Esperanto Semajno - 2011

26-a de Februaro - 5-a de Marto 2011

Agajo (Agay)

Francio - Lazura Marbordo

Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro !

Vi povas plibonigi vian nivelon de Esperanto partoprenante en kursoj

Gvidantoj de kursoj estos:

- 1a Kurso: Stano MARĈEK
- 2a Kurso: Augusto CASQUERO
- 3a Kurso: Spomenka ŜTIMEC

Posttagmeze, vi mem elektos vian programon: promenado, piedirado en la montaro Esterel, familia vivo ĝis la vespero. Distradoj.

Informoj, aliĝoj:

Christine Graissaguel,
Les Iles d'Or,
rue du progrès,
FR 83600 Fréjus
Tél. 0494956618



Kaŝu tiun mamon, kiun mi ne vidu !

Moliero : Tartufo, 3a Akto , 2a sceno, 860a verso

Ni ricevis leteron de iu leganto kiu sufiĉe vigle kritikis la desegnojn aperintajn en La Sago, precipe en la numero 66. Resume dirite: tro da trivialeco, tro da violento.

La argumentoj prezentitaj estas ĝenerale iom leĝeraj, ekzemple, «Ĉu vi metus tiun revuon en la manojn de infano [pro tiuj fidesegnoj] ?» Evidente ne ! Sed nur ĉar en la Sago, malmultaj artikoloj estas kompreneblaj de infanoj : La Sago ne estas revuo por infanoj, sed ja por plenkreskuloj !

Tamen mi trovis el riproĉo, kiu rekte koncernas min, interesan temon por disvolvi. (Mi lasas al la aliaj koncernataj desegnistoj -J. Selle⁽¹⁾ kaj L. Markovo- la zorgon mem rebati aŭ ne, laŭ siaj emoj)

Temas pri la bildeto tute sube en la lasta paĝo. Skandalo ! Virino aperas duon-nude - tamen kun nigra cenzura ortangulo kiu kaŝas la cicojn - Cirklo cirklas la hontindan zonon kun flanka krio «Maldece !» kaj suba komento « Ni ne estas obseduloj» (Bildo 1, live-supre)

Do se mi bone komprenis : ankaŭ tro da erotikaj maldecaĵoj. Nu ! La papera surfaco de La Sago ampleksas precize 1m², la koncerna bild-parto : 1cm², kaj 1m² = 10 000 cm². Do se mi plu bone kalkulis, kun 0,01% da iom «leĝeraj» bildoj, ni jam estas obseduloj. Fulmo ! je tiu kriterio, eĉ ostroj estas plej diboĉaj seksardantaj estaĵoj !

Nia kritikanto maltrafis tion, kio estus eventuale riproĉebla en ĉi bildo: ne la duon-apero de mamoj, ja tute naturaj anatomiaj eroj (eĉ se kun aldono de *iom* da silikono) sed ĉefe pri la dialogo, kiu virvirece aludas al mamoj kaj ties subtenoj, okaze de baloto (sen vortludo kun la ĵus hazarde trafita falsa amiko).

Tiu bildo estas karikaturo, kiu ĝuste celas skurĝi la Tartufojn «Kaŝu ĉi mamon, kiun mi ne vidu !» Kaŝu ĝin, jes, sed tiel ke mi pli bone povus ĝui el ĝi per fantasma elvokado !

Komparu kun la dua bildo, eltirita de reklamaĵo. Mi vetas, ke tiu bildo ne furiozigus nian kritikanton pli ol per eta brovmovo, kun eventuala duonpaŭta grimaco.

Ni analizu ĉi bildon. La pozanta virino, ja aspektas kun multaj «avantaĝoj»: bela vizaĝo, dikaj mamoj, longaj kruroj...

Ĉu vere dikaj mamoj ? Vidu bildon 3, kie mi demetis la akcesoraĵojn, forskrapis la lozajn partojn de la robo, kaj aldonis alian foton ĉerpitan el la sama reklamaĵo (Bildon 4). Se sendube ĉi virino havas ja

belajn senfinajn krurojn, la mamoj havas tute banalan amplekson.

Kiel do tiu mamparo aspektis unuavide tiel avantaĝa ?

Unue per la pozicio de la maldekstra brako, kiu premas la mamon, tiel ke ĝi ŝveliĝas ĉe la centro, gravigante la reliefon en ĉi parto. Tiu efiko estus malpli efika se oni bone vidus la premantan brakon, kiu lasus al la maldekstra mamotre mallarĝan videblan surfacon. Sed ne hazarde la vestoj estas nigraj, fotitaj preskaŭ sen kontrasto. La maldekstra brako, malaperas en la nigreco, kaj la imago povas doni al la mamomulte pli grandan surfacon. Kontrastigante la kolorojn (bildo 3) la efiko malfortiĝas.

La nigreco de la vestoj (robo + mamzono) efikas ankaŭ por la dekstra mamomulto, pro la lozeco de la larĝe malfermita supra parto de la robo: la limo de la mamzono preskaŭ ne videblas, kaj oni facile imagas ĝin iri ĝis la rando de la roba kolumo. (vidu en bildo 3 la realan limon bone videblan post forskrapado de la loza parto de la robo. Sed por vidi tiun limon, mi devis ege grandigi la foton. En normala skalo, ĝi estas kvazaŭ nevidebla)

Fine (bildon 5) vidu kiel la libreto kaj la koliero estas aranĝitaj, tiel ke ili ampleksigas, substrekas, emfazas, pligravigas la trajtojn, por ke fine oni havu impreson de malavaraj mamoj.

La foton subskribis iu J. Walter Thompson, pri kiu mi neniam aŭdis antaŭe. Se hazarde li legas tiun artikolon, li sciu pri mia admiro. Tiu foto estas ĉefverketo, de aŭtenta fakulo pri fotofarado. (Pri reklama efiko, mi ne scias, ĉar persone mi tre bone memoris la virinon, sed ne tion, pri kio ŝi reklamas...)

Por reveni al la temo: oni ne ofendiĝu pro bildoj kiuj nur certigas ke la homa raso klasiĝas kiel mamulo. Jam de longe la mamoj kovritaj estas ofte pli evidente elmontritaj ol la nudaj, pere de tre zorge kalkulitaj efektoj de la vestoj, efikante jen per lozeco, jen per strikteco, jen tion subtenante, kio iom falas, jen tion ampleksigante, kio magras...Homo estas teknika estaĵo kiu teknikigas ĉion. Eĉ la seksan allogon.

Tiun teknikon regas la reklamistoj, kaj seksallogo uzita por vendi ion ajn invadas la gazetojn, la televidajn programojn, la urbajn murojn, kaj neniu plu ofendiĝas, ĉiuj alkutimiĝis - eĉ infanoj, kiuj do tutcerte ne estus perturbitaj vidante peceton de mamomulto en peceto de La-Sago-paĝo.

Sergo Sir'

(1) Reago de J. Selle: sekvantan paĝon.

Enhavo

- 1, Manifestacio kontraŭ
 - 14-15 ksenofobio
 - 2 Flore kuku
Kursoj, staĝoj
 - 2-3 Kaŝu tiun mamon !
 - 4 Libroj vivas pli longe ...
J. Selle reago kaj humuraĵoj
 - 5 Praktikaj informoj
 - 5-6 Kiel traduki: «AIR»
 - 6 Libro-Servo
- Supplément en français**
- 7-8 Crise mondiale du capitalis-
me et congrès mondial de
travailleurs
 - 8-10 Dans la presse. et ailleurs...
 - 11 Kontribuo al Vikipedio
 - 12 Legindaj Legendoj
 - 12-13 La Darwinismo
 - 14 SAT-Kongreso: 1a bulteno
 - 15 Esperantistoj aktivas
 - 16 Konkurso: emblemo
Kloŝmerlo en traduko
Ĉe la lago 68

Seta kongreso

Dum lasta kunveno la OKK de Seto decidis prokrasti la limdatojn:

- unua periodo: 30an de novembro 2010
- dua periodo: 31an de januaro 2011

- kongresretejo:

<http://esperantosete2011.fr/>

- retadresa kontaktilo:

info@esperantosete2011.fr

- telefona kontaktilo:

+33 (0) 467 391 630

Prelegontoj serĉataj : Anoncu vin !

Partoprenis en ĉi numero:

(laŭ alfabeto ordo)

Ana	Flora	Markov	
Andreo	Andrio	Vjeko	Markovo
Francis	Bernard	Vito	Markovo
Ĵomo	Blanŝero	Guy	Martin
Louis	Gohin	Marc	Noulin
Christine	Graissaguel	G.	R.
	Klod		Renato
Ĵak	Le Puil	Jean	Selle
Franjo	Leveque	Sergo	Sir'
Petro	Levi	Juliette	Ternant

Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.



El la vivo de Bervalo sentaŭgulo maldeca epizodaro de Louis Beaucaire

Stafeto 1974, 134 paĝoj, 8,20 €.

Ne plu temas pri ŝercoj, kiel en la «skandala» *Kruko kaj Baniko*, bedaŭrinde elĉerpita, sed pri rakontetoj. Sed jam la titolo mem estas ŝerco... kiam oni konas la libron de Eichendorff «El la vivo de sentaŭgulo», rebedaŭrinde elĉerpita! Ĉar mallongan artikolon deziras nia kara enpaĝigisto, Serj Sir', jen resumo de epizodo, kiu ne povas malplaĉi al SAT-Amikaranoj! Bone ridu!

Tiu tria epizodo titoliĝas: *Kiel mi fariĝis kunfondinto de UEA.*

La intrigo disvolviĝas en Bordelo, *La Sentema Mimoso*, kie la sperta putino Zora havas problemon kun ĉina kliento. Tiam esperantisto kiu hazarde troviĝis tie sukcesas konvinki la bordelestron, Ernesto, organizi Esperanto-kurson por la putinoj. Ĉio iras glate, ĉiuj viraj samideanoj volas ekkoni la unuan bordelon en la mondo, kie prostituitinoj oficiale pepas en la internacia lingvo. La entrepreno de Ernesto tiel ekprosperis, ke li parolis pri tiu sukceso dum kongreso de bordelestroj en Hamburgo. Tiam kreiĝis nova societo, la Unuiĝo de Esperantistaj Amordomoj, mallonge UEA.

Ĉio iras glate. Sed iun tagon usonaj maristoj elŝipiĝas en Roterdamo. Ili hazarde preterpasas konstruaĵon portantan la saman siglon. Pensante, ke tiu domo estas nova amuzejo, ili tuj eniris kaj, prezentante siajn UEA-kartojn, postulis viskion kaj plezurdonantinojn. Kiam oni rifuzis tion al ili, ili ekkondutis skandale, blekante, ke ili plendos ĉe la Centra Oficejo de UEA en Bervalo. Poste, serĉante en la ĉambroj iel uzablajn inojn, ili fine trovis novan junan tajpistinon, kiun ili perfortis sur ŝia labortablo, tiel difektante preskaŭ tute novan skribmaŝinon.

Kiam la bordelestroj konscias ke «ekzistas du UEA-oj: unu vegetanta en Roterdamo kaj unu prosperanta en Bervalo», ili grandanime rezignas la arbitracion de la Internacia Kortumo en Hago, kaj prenas sur sin ĉiujn elspezojn. Ili aĉetas al la tajpistino novan verdan uniforman kalsoneton, al UEA novan skribmaŝinon kun supersignoj. Kaj ekde nun la enirejon de la *Sentema Mimoso* ornamas novaj neonlumigitaj literoj, kiuj anstataŭas la iaman siglon. Efektive por eviti ĉian miskomprenon, la societo de la bordelestroj nun nomiĝas «Senpena Amorado Tutmonda» (SAT).

Ĵak Le Puil



J. Selle reagas...

Meto de punkto super «i»

Laŭ difino troviĝanta en PIV, la humuro estas originala sentomaniero kaj esprimprocedo, kiu kontraŭas al la kutimaj rilatoj inter la aferoj kaj la tono, en kiu oni ilin diras. Tiel oni povas prezenti komikaĵojn kun seriozeco, kaj absurdaĵojn kun soleneco. Ĝenerale oni ŝajnigas nesciadon de la ekzisto de humuro.

De alia flanko, sento estas neintelektala, iel instinkta kapablo taksu la aferojn, juĝi la homojn.

La humuro povas esti esprimita per desegnaĵoj, kiuj ne necesigas artisman konsidere la ordinarcon de la traktitaj temoj, kelkfoje kaj ŝajne trivialaj aŭ satiraj.

Ekzemple, en pasinta numero de *La Sago* aperis desegnaĵo, kiu ŝajne rilatas al virgeco de Johanino de Arko. Fakte, la desegnisto volis reliefigi la absurdecon de iuj sciencaj malkovroj; la himeno de la koncerna heroino same kiel la sekso de la anĝeloj, ne alportas utilon al homa progreso. Kompreneble, predikanto rajtas opinii la malon.

En simila maniero, aperis en *La Sago* du desegnaĵoj montrantaj nazon apud pugo. Ĉi tiu lasta devas esti rigardata kiel simbolo de intemeco: unu montras troan enketemon de la polico, la alia, eksceson en uzo de Interreto.

Jean Selle

...kaj plu humuras

Novliberala aksiomo pri la universala altirforto.



Post la morto de teama subtenanto.



Kia katastrofa matĉo! Feliĉe paĉjo ne vidas tion!

Bonvolu pretiĝi, por akompani vian karan mortinton ĝis sentelevada stadiono!

Pigruloj!

Kaj ili spitas la flagon de paĉjo!



Praktikaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-	Marde*	10h00 - 16h00 okaze
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado: ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, **ĉiun ĵaŭdon**, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj **ĉiun vendredon** je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Trigrado: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

■ Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:

Claude Gerlat
38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2010 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 € ; Svisio : 3,80 F.S. ; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2010 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro

CCP: 37 852 90 L La Source.

(Ĉekoj al la kasisto : Guy Martin)

IBAN, (por pagi el eksterlando):

SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314

BIC: PSST FRPPSC

■ **En Belgio:** Claude Glady :

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :

Poŝta konto n° 23-14908-9.

La SAGO: Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Redakt- kaj korektskipo : Andreo Andrio,

Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir'.

Helpas al la korektado: Janine kaj Yannick

Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet,

Lino Markovo.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@free.fr, **tekstoj** en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj prefere en Unikodo, bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku margene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuajoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la tuj sekvanta numero.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe Guy Martin,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo : www.sat-amikaro.org

Reto: sekretario@sat-amikaro.org

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto : claud.gerlat@orange.fr

Claude Glady : Rue du Culot, 1; B-5630

Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean : Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Guy Martin : 3 rue Voltaire

22000 Saint-Brieuc

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto : lasago@free.fr

SAT

Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

Kiel traduki Air

La franclingva nomo **air** havas tri signifojn, respondantaj al la esperantaj vortoj **aero**, **aspekto** kaj **ario**. La tradukoj estas multe pli diversaj, pro la uzo de tiu vorto en figuraj sencoj.

■ La unua signifo de **air** estas la spirebla gaso, kiu ĉirkaŭas Teron, do **aero**. Ĉi sube estas kelkaj frazoj respondantaj al tiu signifo:

L'air est constitué essentiellement d'azote et d'oxygène. **Aero konsistas precipe el nitrogeno kaj oksigeno.**

Les autos polluent l'air. **La aŭtomobiloj poluas la aeron.**

Il aime marcher au grand air. **Li ŝatas paŝi en libera aero.**

Laisser les fleurs sécher à l'air libre. **Lasi la florojn sekiĝi en libera aero.**

Un concert en plein air. **Subĉiela koncerto.**

Il aime les jeux de plein air. **Li ŝatas la plenaerajn ludojn.**

Le médecin a prescrit un changement d'air. **La kuracisto preskribis aerŝanĝon.**

Après dîner il va prendre l'air. **Post la vespermanĝo li iras promeni.**

Je ne supporte pas les courants d'air. **Mi ne eltenas la trablovojn.**

Il y a de l'air aujourd'hui. **Hodiaŭ ventetas.**

Les bureaux ont l'air climatisé. **La oficejoj estas klimatizitaj.**

L'air comprimé peut alimenter des moteurs pneumatiques. **Kunpremita aero povas funkciigi pneŭmatajn motorojn.**

On ne peut vivre de l'air du temps. **Ne eblas vivi per nura aero.**

Il est libre comme l'air. **Li estas tute libera, kiel birdo aera.**

Il ne manque pas d'air. **Ne mankas al li aplombo.**

■ En figura senco tiu vorto montras la liberan spacon ĉirkaŭ kaj super ni:

Une fumée monte dans l'air. **Fumo leviĝas en la aero.**

Le monte-en-l'air est enfin emprisonné. **La ŝtelisto fine estas malliberigita.**

Le prisonnier a joué la fille de l'air. **La malliberulo forfuĝis.**

Les transports par air sont les plus rapides. **La aertransportoj estas la plej rapidaj.**

L'armée de l'air utilise des avions. **La aerarmeo uzas aviadilojn.**

Une hôtesse de l'air. **Aerstevardino.**

Il a le mal de l'air. **Li suferas aermalsanon.**

Ce ne sont que promesses en l'air. **Tio estas nur promesoj en aero.**

Tirer en l'air. **Pafi al la ĉielo.**

Il regarde en l'air au lieu d'écouter la leçon. **Li gapas al la ĉielo anstataŭ aŭskulti la lecionon.**

C'est une tête en l'air. **Li estas ventkapulo.**

De colère il a flanqué en l'air tout le travail. **Pro kolero li aerdisigis la tutan laboraĵon.**



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
Sabate 11H-18H)
Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
Al ĉiu mendo
aldonu:
40% ĝis 5€
35% ĝis 10€
25% ĝis 20€
20% ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Ces idées étaient dans l'air du **Tiuj ideoj ŝvebis en la aero.**
temps.

L'air du temps est à la vitesse. **Nun furoras rapideco.**

Il est passé prendre l'air du bureau. **Li pasis en la oficejo por senti ties etoson.**

Il y a de l'orage dans l'air. **Eksplodema estas la etoso.**

■ La vorto **air** esprimas ankaŭ la aspekton, la mienon aŭ la ŝajnon:

Il a l'air indifférent mais pas malade. **Li aspektas indiferenta sed ne malsana.**

Il a un drôle d'air. **Li havas strangan mienon.**

Ces deux personnes ont un air de **Tiuj du homoj havas kelkajn**
famille. **samfamiliajn trajtojn.**

Prendre un air moqueur. **Fari mokan mienon.**

Il a l'air d'un fou. **Li aspektas kiel frenezulo.**

Elle avait l'air soucieuse. **Ŝi havis maltrankvilan mienon.**

Il a l'air de me détester. **Li ŝajne abomenas min.**

ça n'a pas l'air d'aller. **Ŝajnas, ke vi ne bonfartas.**

Cette maison n'a l'air de rien, mais **Tiu domo ŝajnas sensignifa, sed ĝi**
elle est confortable. **estas komforta.**

Il est parti sans avoir l'air de rien. **Li foriris diskrete.**

Avoir l'air sérieux. **Mieni serioze.**

Avoir un air modeste. **Aspekti modeste.**

Elle a grand air en robe du soir. **Ŝi bele aspektas en vespera robo.**

Prendre de grands airs. **Afekti pretendeman sintenadon.**

■ La tria signifo de **air** estas kantmelodio, do **arion**:

Siffler un air à la mode. **Fajfi laŭmodan arion.**

J'entends un air de flûte. **Mi aŭdas flutan arion.**

Andreo Andrio

Ce monte-en-l'air ne manque pas d'air: il part l'air de rien, en me sifflant mes bijoux et son air favori «la fille de l'air»!

Exercice de contrôle:

Traduisez :

Attention, ça a l'air facile, mais il y a des pièges!

Solve :

Atentu, tio ŝajnas facila, sed estas kaptiloj!

Elle a l'air fâché: c'est le moment de prendre l'air: les activités de plein air sont plus dans l'air du temps!



Ni ĵus informiĝis pri la forpaso de k-do **André Legros**, la 10an de septembro. Li estis 90-jaraĝa.



Pli detalan artikolon ni publikigos en onta La Sago.

Minimuma kotizo al SAT-Amikaro

Ĉu mi estas membro de SAT-amikaro en 2010? Antaŭ 4 monatoj, mi tiklis vin per tiu demando. Intertempe, vi trovis kaj kutimos legi la respondon en la sendofolio de via preferata revuo.

Ni scias ke por kelkaj membroj, mankas mono por pagi sian kotizon. La komitato decidis krei liberan kotizon minimuma sed nenula. Ni uzos la solidarkason por kompletigi la pagon.

Kun helpo de perantoj kaj lokaj grupoj, ni lastfoje realvokas ĉiujn membrojn, kiuj ne repagis la jaran kotizon en 2010. Se vi frontas financan problemon, ne hezitu tamen aliĝi per tiu nova kotizo, grava pro ties simboloj: volo kaj solidareco.

Por la komitato
La kasisto, Guy Martin

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

Crise mondiale du capitalisme et congrès mondial de travailleurs

L'espéranto est bien une langue vivante, un moyen de communication efficace qui a permis à des gens de différentes parties du monde et régions linguistiques de se rencontrer à Brasov pendant une semaine au début d'août. Le but de cette assemblée n'était pas seulement des vacances dans une ambiance fraternelle, mais encore la formation réciproque active de progressistes rationalistes qui combattent pour un monde sans exploitation ni oppression.

Alors que l'espéranto a déjà 123 ans, l'organisation en congrès a été fondée seulement une trentaine d'années après la parution de la langue révolutionnaire, en 1921, à une époque des plus révolutionnaires. Toujours association culturelle de lutte de classes et d'avant-garde, l'association mondiale sans caractère national S.A.T., association de prolétaires espérantistes, s'est focalisée sur le sujet «La crise économique et ses effets multilatéraux». Puisque, si au temps de la révolution soviétique il est déjà apparu que la révolution socialiste ne pouvait réussir qu'à l'échelle mondiale et non sur un territoire isolé (même s'il s'agit de

conditions politico-économiques, qui sont de plus en plus aigus en de nombreux endroits.

La spécificité de l'association S.A.T. consiste à accomplir sa tâche éducative, culturelle et de formation en facilitant le contact direct des personnes les unes avec les autres en dépit de leur diversité d'origine nationale ou autre que nationale, formant un réseau sans intermédiaires de membres individuels autonomes. Basant son fonctionnement sur l'échange d'expériences et d'idées, l'association permet à ses membres par l'utilisation permanente de la langue médiatrice espéranto d'acquérir «une capacité de sentiment, de pensée et d'action en dehors du contexte national» et participe en la complétant à l'activité des organisations non espérantistes engagées dans la lutte des classes, qu'elle aide dans la mesure du possible par une collaboration intime au niveau culturel.

Un autre ciment essentiel à la cohésion de l'association est sa position au-dessus des courants. La S.A.T. n'étant pas elle-même une organisation politique, toutes les idées progressistes soutenant l'effort d'émancipation de l'ensemble des travailleurs du monde entier y sont les bienvenues et elle laisse à ses membres la responsabilité de se forger à eux-mêmes dans un esprit libéré de tout dogmatisme leur propre opinion et de choisir eux-mêmes la voie qu'ils jugent la plus directe et la plus praticable pour conduire l'humanité à l'accession la plus complète possible au bien-être social et personnel.

Concrètement l'association a donc ac-

compli ses tâches statutaires à la faveur de son congrès annuel, d'une part dans ses séances annuelles relatives à la vie de l'Association, à son fonctionnement pendant l'année écoulée et à l'activité à planifier pour l'année suivante, d'autre part en ouvrant des forums sociaux sur



des sujets de politique sociale générale dans le cadre de débats d'une durée d'une heure avec un bref exposé d'introduction. Les sujets abordés cette année ont été entre autres: les syndicats dans la Roumanie actuelle, le militantisme direct en Corée, la culture roumaine, les banques éthiques, le racisme, le mouvement ouvrier au vingtième siècle, l'espérantisme (pour quoi faire?), la crise économique. Les conclusions de ces discussions se reflètent dans la déclaration du congrès.

Il convient aussi de mentionner que le congrès, en marge des séances denses de tension cérébrale, a soigné un programme culturel particulièrement riche en spectacle et notamment en excursions. En ce qui concerne les spectacles, il convient de souligner les efforts accomplis pour deux petits concerts présentés par des écoliers de Brasov, qui ont chanté aussi en espéranto. Le petit chœur d'enfants «Kanzonetta» a également joué et chanté joliment dans le cadre impressionnant d'une église à l'abri au milieu de la forteresse de Prejmer. Et étonnante a aussi été la prononciation parfaite des acteurs



sième du monde), aujourd'hui ce caractère mondial paraît même plus éclatant à cause des problèmes mondiaux de l'humanité, tels que la guerre, la faim, et plus généralement une misère déstabilisante, tous plus ou moins liés à des





non-espérantistes, qui ont déclamé en jouant la «Cantatrice chauve» de Ionesco dans la traduction de Georges Lagrange. Au cours des excursions ont été visitées, entre autres, Rasnov, Sibiu, la ville d'André Cseh, l'espérantiste marquant qui a popularisé l'enseignement de l'espéranto par la méthode directe, et les excursions à Bucarest et à Sigisoara, sans oublier l'excursion d'après-congrès dans la réserve naturelle du Delta du Danube.

A l'occasion du congrès trois nouveaux ouvrages ont été édités par l'Eldona Fako Kooperativa (section coopérative d'édition): - Kanto Ĝenerala (chant général), de Pablo Neruda, constitué de neuf poèmes, que le chœur interrégional Interkant' a présenté en diverses occasions et lieux (jusqu'au Théâtre national de la Havane pendant le Congrès Universel d'Espéranto!), sur une musique de Mikis Theodorakis; - Tuikero, la harkio, kaj la cetero (Tuikero, le harki, et tout le reste), de Roger Condon, témoignage écrit d'origine en espéranto sur l'expérience d'un jeune soldat français vécue pendant la guerre d'indépendance de l'Algérie; - Traité d'Athéologie, de Michel Onfray, essai sur l'athéisme d'un philosophe actuel, qui a déjà eu une

certaine diffusion internationale à travers des traductions en langues nationales mais qui atteindra maintenant un public mondial par cette traduction en espéranto publiée avec l'approbation enthousiaste de l'auteur, qui a pour l'occasion écrit une préface spéciale où il décrit le problème linguistique et appuyant l'espéranto comme solution au problème né de la tour de Babel. La Section d'Édition après le congrès a déjà édité un ouvrage de plus: - Rêves de Cristal, de Jérôme Leroy, nouvelle de science-fiction décrivant l'aventure vécue par deux jeunes gens dans un monde glaciaire post-industriel de 2064.

Et depuis un an est en cours de réalisation un ambitieux projet: - un film documentaire sur l'espéranto, de Dominique Gautier, qui décrit la réalité concrète du monde espérantiste actuellement en 2010, et qui sera prêt en avril 2011 (plus d'informations sur: esperantofilmo.com).

On prépare déjà le congrès suivant qui sera hébergé dans la ville balcanique de Sarajevo entre le 30 juillet et le 6 août 2011.

Traduit de l'espéranto
par Petro Levi

<http://satesperanto.org/Gazetartikolo-2010.html>

Dans la presse...

Les langues se délient...

...sur deux radios locales : RCF Pays de l'Ain (fréquence 93,9 MHz) et Radio Tropiques FM (fréquence 93,9 MHz):

Une émission hebdomadaire en alternance une semaine sur le patois et la semaine suivante sur l'espéranto :

- * pour RCF Pays de l'Ain : Le jeudi à 19h15
- * pour Radio Tropiques : Le lundi à 12h00

Rediffusion, émission commune patois/espéranto :

- * pour RCF Pays de l'Ain : le vendredi 11h45
- * pour Radio Tropiques : mardi à 8h45.

Vous pouvez écouter les émissions de radio en les téléchargeant à partir des liens donnés sur le site. Chaque émission dure environ 12 minutes.

Comme l'an dernier les clubs espéranto de Châtillon sur Chalaronne et Bourg en Bresse organisent conjointement un week-end de travail et détente au Chalet du Manon du **15 au 17 octobre 2010**.

Renseignements sur le site: <http://sites.google.com/a/chatillon-sur-chalaronne.net/esperanto-chatillon/>

■ La République des Pyrénées, 15 septembre 2010 : une pétition pour l'espéranto au bac



Frédéric Scibor, espérantiste, président du Kiosque et Guy Camy. © ascension torrent

Le mouvement espérantiste lance une pétition pour obtenir la mise en place d'une option espéranto au bac. Seule en Europe, la Hongrie propose l'enseignement de cette langue à l'école. Le Brésil et le Chili le permettent également.

L'association « langue espéranto 64 », basée à Pau, va relayer cette pétition tout au long de l'année. Il en sera aussi question jeudi 16 septembre lors de sa conférence de rentrée qui se tiendra à 20 h 30 au complexe de la République à Pau (salle 501). En plus de la présentation de cette jeune langue (créée en 1887 par le Polonais, Ludwik Zamenhof), Guy Camy, vice-président de l'association, fera un état des lieux de cette langue et précisera ses enjeux économiques, sociaux et humains. Cette soirée a aussi pour but de présenter les cours d'espéranto qui se tiendront tous les jeudis à 18 h 30 au Kiosque (15, rue de la République) à partir du 23 septembre.

Source : <http://www.larepubliquesdespyrenees.fr/2010/09/15/une-petition-pour-l-esperto-au-bac,155624.php>

Ma première Fête de l'Huma !

De nouveau cette année 600 000 visiteurs ont eu l'occasion de voir le stand «Espéranto», bien placé à l'angle d'un carrefour, dans lequel une quinzaine d'espérantophones se sont relayés et ont récolté plus de 800 signatures en faveur de l'adoption d'une option «Espéranto» au bac (Voir ci contre).

Voici les impressions d'une nouvelle venue dans l'équipe. (Voir article en Eo et photos en pages 15)

C'est avec une certaine appréhension que je suis arrivée à La Courneuve ce samedi matin. Les grands rassemblements me font toujours cet effet, peur que ça dérape, d'être perdue au milieu de tous ces inconnus ... et là en plus j'y allais pour parler de l'Espéranto ! Ça va pas les intéresser, ils vont nous envoyer balader, ... voilà en gros dans quel état d'esprit j'ai franchi les barrières !

Et en fait, très bonne surprise ! Une ambiance très sympa, des gens plutôt curieux et ouverts, de la bonne musique et un grand plaisir à tenir le stand. Alors bien sûr, il a aussi fallu renseigner sur la direction pour la grande scène, les toilettes ou la sortie, la nuit a été très courte et pas super confortable (mais je ne venais pas pour dormir) et on a eu droit à quelques lourdaux un peu éméchés en fin de soirée pas franchement en mesure d'apprécier le travail de Zamenhof, mais je garde malgré tout un très bon souvenir de ma première fête !

Toutes mes félicitations à tous les organisateurs, je suis une très petite joueuse avec ma seule nuit sur place et ma non participation au montage et au démontage du stand.

Et je serai là l'an prochain, avec pour objectif de participer plus à la Fête et moins au stand (je rigole, Fred !).

Ana

■ **La Voix du Nord** publie le 22 août un article intitulé **Alain Godon réinvente l'art avec son « Bildoreliefo »**[1]

Alain Godon est l'inventeur d'une nouvelle conception artistique, née de l'union d'une technique ancestrale, l'huile sur toile, associée à un travail numérique. qu'il appelle le « bildoreliefo ».



Après Andy Warhol qui coloriait ses photos, Godon fait l'inverse : il part de l'une de ses toiles, qu'il photographie en très haute définition. il démonte ensuite pièce par pièce ses éléments constitutifs pour les remonter sur une ombre qui provoque un extraordinaire effet de relief. Le caractère original de

la toile est conservé. Chaque tirage devient ainsi unique.

Présentée en 2009, au Pavillon des arts et du design aux Tuileries à Paris, et dans une galerie de Central Park South à New York, cette technique est un passage obligé pour ceux qui suivent l'histoire de l'art et ses évolutions. Alain Godon se veut le leader de « l'espérantisme », mouvement dont le manifeste est, à l'instar de l'espéranto, la communication universelle entre l'art et les hommes. On peut en voir la démonstration dans la salle du fond de l'exposition. Et à la galerie Fardel, vous pourrez aussi vous attarder sur ses trois toiles géantes de bouquets, qui ont enfanté de nombreuses aquarelles.

• G

Source : http://www.lavoixdunord.fr/Locales/Montreuil/actualite/Secteur_Montreuil/2010/08/22/article_alain-godon-reinvente-l-art-avec-son-bil.shtml

[1] «Bildo-reliefo» signifie «relief d'image» en espéranto

L'espéranto fait son apparition sur le site internet du Forum Social Mondial

Suite à une initiative des espérantistes mexicains qui ont proposé au Conseil International du Forum Social Mondial d'utiliser la langue internationale espéranto comme langue de travail, on peut lire sur la page d'accueil du site du F.S.M. (<http://www.forumsocialmundial.org.br/>) l'information suivante:

«Bulletin FSM en espéranto

Lisez l'édition d'août traduite par des membres de la fédération mexicaine d'espéranto et examinée par l'association allemande d'espéranto.»

Un lien conduit au texte traduit en espéranto:

http://www.forumsocialmundial.org.br/noticias_01.php?cd_news=2808&cd_language=1

AFCE Association Française des Cheminots pour l'Espéranto

Fête Zamenhof :
11 décembre, 14H30
17-19 rue Traversière
Paris 12^{ème}



Etsuo Miyoshi, Japon
président de la société «SWANY»
qui voyage au moyen de ses deux valises «walking bag»,
et fait paraître tous les ans des annonces dans «Le Monde»
sur l'espéranto,
présentera une causerie intitulée:
«*Ĉu guto traboras la monton granitan ?*»
(«Est qu'une goutte transperce la montagne de granit ?»)
le 18 novembre 2010 à 17h30, Salon Lutèce, 6^{ème} étage,
9 rue du Château-Landon, Paris 10^{ème}

Vous désirez :

- Voyager
- Découvrir d'autres cultures
- Avoir de nouveaux amis
- Communiquer facilement à l'étranger
- Apprendre plus facilement d'autres langues...

OSEZ L'ESPÉRANTO !

Consulter notre site :

<http://ifef.free.fr/afce>

Prenez des cours :

À partir du jeudi 21 octobre 2010 à 17h30
(Cours tous les jeudis au siège de l'AFCE)

Suivez un stage :

Calendrier des stages 2011

- Nilvange : 4 au 8 avril
- Paris : 25-26-27 mars
- Lyon : 6 au 10 juin
- Toulouse : 5 au 9 septembre

stage.esperanto-afce@laposte.net

Contactez nous :

Association Française des Cheminots pour l'Espéranto
9 rue du Château-Landon-75475 PARIS CEDEX 10

Vendredi 12 Novembre à 20h

CONCERT JOMO

Proposé par le Rabelais, Centre Socioculturel de CHANGÉ - 10km S-O du MANS – dans le cadre de son 20^{ème} festival Changé d'Air, et en partenariat avec le Groupe Espéranto du Maine.

Cabaret Concert
Ven 12 Nov. 20h

JOMO CHANTE L'ESPÉRANTO

Connaissez-vous l'Espéranto ? Créée au XIX^{ème} siècle, l'Espéranto avait vocation à devenir une langue pacifiste et universelle. Aujourd'hui parlé par plus de 2 millions de personnes dans le monde, l'Espéranto est un symbole fort du rapprochement entre les cultures. C'est pourquoi nous vous proposons de découvrir cette langue originale à travers un cabaret-concert avec le chanteur Jomo !

Jean-Marc Leclerc, alias JOMO, s'inspire de l'Espéranto, mais surtout de nombreuses influences musicales (polonaises, russes, ukrainiennes, Tziganes, juives...). Il figure également dans l'édition 2000 du Livre Guinness des records pour le record du concert multilingue : 22 chansons en 22 langues ! Depuis, il est invité à travers le monde entier : Chine, États-Unis, Argentine. Il nous vient spécialement de Toulouse pour un concert original. Plus qu'un artiste Espérantiste : JOMO est un phénomène à découvrir !

Cette soirée est organisée en partenariat avec le groupe Espérantiste du Maine.

Tarifs : Plein : 8 € • Adhérents associatifs : 6 € • Réduit : 4 €

En première partie

Présentation de la création de danse contemporaine, signée Cathy Riand. Une évocation à travers la culture Tzigane des danses du monde.

Res. : Pascal Bergeot tél : 06 65 42 22 09

La fête des Ayres

«La fête du Travailleur lozérien» a eu lieu à Saint Hilaire de Lavit, en Cévennes, Lozère, du 20 au 22 août 2010.

Au programme : concours de pétanque, débats politiques avec Francis Wurtz, membre du Conseil national du PCF, musique avec le groupe «Caroline Jazz Band», théâtre avec David Villanova, bal avec l'orchestre «Maxime Lewis» de la région toulousaine, repas préparés sur place avec les produits locaux et stands : stand du livre des Éditions Diderot avec l'écrivain Gérard Le Puill, journaliste, de la foire aux livres à 1 euro, du Vietnam, de la Palestine, des objets artistiques... et, pour la première fois, un stand de l'Espéranto tenu par des membres de l'association «ESPERANTO-info».

La chaleur était au rendez-vous ; le parc automobile débordait sur la route...

Le stand espéranto étant très particulier, peu de curieux s'y sont arrêtés mais souvent nous avons parlé longuement avec des personnes ayant entendu parler de l'espéranto ou découvrant cette langue internationale neutre et équitable. Quelques personnes ont laissé leur adresse pour un au revoir.

Dans l'Huma-Dimanche vendu ce jour, se trouvait justement un article de Francis Wurtz sur le problème des langues dans l'Union européenne, lequel problème était bien vu mais la solution : que

chacun apprenne les langues les plus importantes de l'Union européenne... (et les autres ?) N'ayant pas trouvé l'occasion de lui parler, j'ai envoyé une lettre à l'Humanité-Dimanche.

L'ambiance a été tellement sympathique que nous avons déjà retenu notre place pour l'an prochain !

Francis Bernard



Ci-joint la lettre :

Bonjour,

Je n'ai pas voulu déranger Francis Wurtz qui se trouvait, comme moi, à la fête des Travailleurs, aux Ayres, Lozère, le dimanche 22 août. J'ai lu en priorité son article paru dans l'Huma-Dimanche du 19 au 25 août 2010 car tenant un stand «ESPERANTO» à cette fête, je voulais vite savoir quelle solution il donne aux problèmes des langues puisqu'il a écrit en titre, page 73 :

«Europe, la diversité des langues en danger».

Il écrit : «Il est inacceptable d'exiger de qui que ce soit de renoncer à s'exprimer dans sa langue pour participer à un appel d'offre ou à un concours».

Malheureusement, c'est ce qui s'est toujours fait : une langue hégémonique passe toujours, dans ces cas, avant les autres !

Et Francis Wurtz donne comme solution, celle-ci :

«Aujourd'hui, les bourses Erasmus ouvrent fort heureusement des perspectives plus assurées aux jeunes européens qui ont la chance d'en bénéficier.» «Cela doit devenir un droit pour tous et pour toutes !»

Oui, mais la réalité est là : même dans le cadre d'Erasmus où il y a plusieurs langues utilisées, l'une d'entre elles est presque toujours l'anglais ! Et pour combattre la tendance hégémonique d'une langue, il écrit : «...tout effort de créativité pour s'en émanciper mérite, à l'inverse, un soutien absolu.»

Et bien, je lui demande «son soutien absolu» pour promouvoir dans son prochain éditorial, notre «effort de créativité» en présentant comme une solution à ces problèmes de langues, la langue internationale espéranto n'appartenant à aucune nation, neutre, donc équitable, ce qui permettrait de préserver les langues maternelles menacées par la langue hégémonique.

Je suis étonné que Francis Wurtz ne parle pas de cette solution puisque des espérantistes tiennent, chaque année, un stand d'espéranto à la fête de l'Huma, que Marie-Georges Buffet a rappelé par lettres, en 2007, les deux propositions de loi des députés communistes en 1995 et 1997, en faveur de l'espéranto.

Bien fraternellement.

Francis Bernard
président de l'association nationale
ESPERANTO-info
48210 Mas Saint Chély

Qu'est-ce que SAT ? Sennacieca Asocio Tutmonda: Association Mondiale Anationale, fondée en 1921, est une association mondiale de travailleurs et plus généralement de progressistes dont l'activité est centrée sur la culture et l'éducation populaire. Elle utilise l'espéranto comme langue de travail.
www.satesperanto.org

Qu'est-ce que SAT-Amikaro ? L'amicale de SAT: l'Union des Travailleurs Espérantistes de Langue Française, fondée en 1945, est l'association espérantiste de langue française qui s'occupe de diffuser et enseigner l'espéranto en francophonie dans les milieux progressistes et permettre ainsi l'accès à SAT.
www.sat-amikaro.org

Renseignements Pratiques

Permanence au siège

Lundi	17h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00 (non régulière)
Mercredi	14h30 - 18h00
Jeudi	15h00 - 18h30
Vendredi	09h30 - 17h 00 puis 17h30-19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

- Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac
- Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.
- Les samedis** 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claud.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: <libroservo@sat-amikaro.org>

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
BELGIQUE : Claude Gladys, Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine
SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

LA SAGO - Octobre 2010.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Transvikipedie: *de Fr: al Eo:* Olympe de Gouges

Mi partoprenis en manifestacio, pri virina tago, pri respekto koncerne la virinojn, samrajteco dum la vivo. Prave, Maŭ Zedong diris ke la virinoj estas la duono de la Ĉielo, sed nun, ankoraŭ, ili devas batali por egaleco, kaj respekto. Mi povas piediri en «*Gay Pride*», ĉar nuntempe, aliflanke, la netoleremo preskaŭ ĝeneraliĝas, ĉu religiema dogmaro, ĉu ŝtata absolutismo. Pli kaj pli, formo de rasismo estas privilegiita de la Ŝtato, de leĝoj preskaŭ faŝistaj. En sia epoko, *Olympe de Gouges* estis pionirino kaj viktimo.

Scivole, mi alproksimiĝis apud batalantinoj, kaj demandis «Ĉu vi scias kiu estis *Olympe de Gouges*?». Neniu respondis, ĉar neniu konis la ekzaktan respondon. Certe, en feministaj asocioj, oni povas paroli pri *Flora Tristan* (la avino de *Gauguin*), arda proletara socialistino, *George Sand*, *Louise Michel*, *Elisabeth Demitrieff*, *Sofia Lvona Perovkaia*, *Vera Figner*, *Alexandra Kollontaj*, *Simone de Beauvoir*, sed inter ili, *Olympe de Gouges* estas tute forgesita.

Ŝiaj vidpunktoj, ĵus antaŭ la Revolucio, sub monarkio kiu, ankoraŭ, posedis senliman povon, ŝajnis proksima al herezo. Ne forgesu ke iu junulo (*Chevalier de la Barre*), sub Ludoviko la dekkvina, estis mortigita pro blasfemo.

repertuaro de la Komedio. Tiel, ŝi estis rigardita kiel damaĝanta gravajn ŝtatajn interesojn, kaj *Olympe de Gouges* estis internigita en Bastilon. Dank' al pluraj protektantoj, la sigelletero estis nuligita. Ŝi dediĉis al tiu honto – la sklaveco – multe da verkoj, sed, daŭre, kontraŭ ŝi, oni trovis la kolonian premgrupon ĉiam tre potenca, kaj ankoraŭ validan «la nigran kodon», el Ludoviko la Dekkvara. Ŝi verkis la sekvantan teatraĵon «La vendejo de la nigruloj» (1750), kaj poste «*Rimarkoj pri Nigruloj*».

Tiel, ŝi tion povis skribi «La speco homoj-nigruloj ĉiam interesis min pro sia sortaĉo. Miaj scivolo, kaj rezono neniam estis kontentigitaj de homoj konsultitaj, ĉar ili taksis tiujn malfeliĉajn homojn kruduloj, malbenitaj de Dio. Sed maljuniĝante, mi klare konstatis, ke temis pri perforto, kaj antaŭjuĝo, kiuj ilin komdamnis al tiu abomena sklaveco, ke la naturo neniel kulpis, kaj ke precipe temis pri la maljusta kaj potenca monavido de blankuloj».

Vi povas elvoki tiun kuraĝan virinon, kiu en septembro 1791, verkis la Deklaracion de la rajtoj de virino kaj civitanino «artikolo unua: la virino naskiĝas libera kaj restas senŝanĝa laŭleĝe de la naturo.»

Tiuj rajtoj estas la libereco, havaĵo, sekureco, kaj precipe konstruistaro al premo». Poste, ŝi alparolos la virojn kaj virinojn «Viro! Ĉu vi estas kapabla esti justa? Kiu donis al vi la superegan influon por subpremi mian sekson?» *Olympe* estas zorgema pri socia situacio de la popolo. Antaŭtempe, ni povas rekoni la lingvaĵon de la Pariza Komunumo de 1871. En 1788, ŝi verkis - publikigita de Ĝenerala gazeto de Francio - du broŝurojn pri patriota imposto, en sia «*Letero al popolo*», por patriota imposto. En la dua broŝuro, ŝi klarigas ampleksan programon de sociaj reformoj. En 1792, ŝi rekuniĝis kun la *Girondins* (federisma grupo), kontraŭa al la *Montagne* aŭ la *Jakobenoj*, pli ekstremismaj).

Poste, la 10an de aŭgusto 1792, ŝi fariĝis amikino de *Michel de Cubières*, ĝenerala sekretario de la komunumo. Respublikana, ŝi kontraŭis la morton de Ludovikola Deksesa, per la pravigodereĝo antaŭ la Nacia Konvencio, kiu malestime malkonsentis.. *Olympe de Gouges* atribuis al Marat la amasbuĉadojn de Septembro 1792. Ŝi deklaris ke la sango, eĉ de kulpuloj, kruele kaj abundege verŝita, eterne aĉigas la revoluciojn.. Ŝi akuzis *Robespierre-n* pro diktatura ambicio. Politike, la pozicio de *Olympe de Gouges* iĝis pli kaj pli danĝera, kiam ŝi tion diris «*Montagne, Plaine, Roandistes,*

Brissotins, Girondins, Robespierristes, Maratises, foriru, definitive foriru. Ke la nomoj de leĝofarantoj, fratoj, anstataŭ vin, por la socia kvieteco, triumfo de patrio» *Olympe de Gouges* kaŭzis malamon. Arestita, pro kontesteco koncerne la respublikajn principojn, ŝi estis vokita antaŭ la revolucia tribunalo kaj kondamnita al mortpuno. Antaŭ la ekzekuto, ŝi verkis tiun leteron al la prezidanto de la Konvencio: «Mi estas kondamnita al mortpuno, pro troa kulto de la revolucio. Miaj malamikoj pardonu al mi, tiun krimon, kiel mi pardonas al ili. Ve! Mi ne postulas la revizion de tiu nekredebla kondamno». Ŝi petis novaĵojn de sia filo, generalo en rejnaj armeoj. Ŝi sendis siajn adiaŭojn. Ŝi estos gilotinita la 3an de novembro 1793.



Olympe de Gouges
- senkapigo -



Olympe de Gouges
- kapo -

Olympe de Gouges naskiĝis, en 1748, (*Montauban*), devena el burĝa familio. En 1765, deksepjara, ŝi estis edzinigita kun pariza pladvendisto, *Louis Yves Aubry*. Post kelkaj monatoj, la juna edzino naskis filon, Petron. Iom poste, ŝia edzo mortis. Pro sia geedza sperto, ŝi ne havis multe da feliĉo. Do, ŝi ne volis reedziniĝi, kvalifikante la geedziĝon kiel «*tombon de la fido kaj amo...ĉu la virinoj ne konsistigas la duonon de la socio? Kaj bedaŭrinde, iom da partopreno kontribuas la perdon de alia duono*».

Pro opiniprenoj, jam la vivo de *Olympe de Gouges* estis tre danĝera. Sub monarkio, pro multe da plendoj, je la nomo de du eminentuloj - barono *de Breteuil*, kaj marŝalo *de Duras* - nobeloj ĉe la Asembleo kaj ministroj - kiuj malpermesis la teatraĵojn kontraŭ sklavistoj, el

Ekzistas tiu reago je la nomo de *Pierre Gaspard Chaumette*, el la parizkomunumo : «Vi memoru pri tiu vireska virino, la malĉasta *Olympe de Gouges*, kiu la unua, fondis virinajn sociojn, forlasante la dommastrumadon kaj kiu volis politiki. Ŝi kulpis pro krimoj. Ĉiuj tiuj malmoralaj virinoj estis ekstermitaj sub la venĝa ferpinto de la leĝoj, ĉu vi volas imiti ilin? Ne! Vi ne estos interesaj, kaj vere indaj je estimo, kiam vi estos tio, kion la naturo volis. Ni volas ke virinoj estu respektataj, tial ni devigos ilin respekti sin mem».

Certe ja, ŝia filo malagnoskis ŝin, por daŭrigi sian militan karieron. Li estis forgesita, sed *Olympe de Gouges*, eĉ kun siaj difektoj, kaj kvalitoj, estis pionirino de la virina emancipado, kaj kontraŭkolonialismo. La virinoj devis atendi ĝis 1945, por gajni la civitanajn rajtojn, dank' al *Olympe de Gouges*, kaj aliaj virinoj pri kiuj mi skribis en la komenco de tiu artikolo.

Louis Gohin.

Fontoj:

- Fr:Wikipedia

-«voyage au bout d' une vie- *Olympe de Gouges*- la révolte d' une femme».

Redaktora noto: Tiu artikolo povas konsistigi bazon por Esperanta versio de *Olympe de Gouges* en Vikipedio...

Legindaj Legendoj Meluzino.

«Leginda Legendo» invitas vin legi legendojn el ĉiuj kontinentoj akompanatajn de lingvaj klarigoj. Kvankam ĉefe destinita al komencantoj, «Leginda Legendo» povas interesi ĉiujn legantojn!

Antaŭlonge, la feino Meluzino loĝis en la «Kuvoj», profunda multgaleria¹ groto, piede² de kruta Verkora klifo apud Grenoblo, el kiu tumulte elkuras impeta rivero. Kompreneble, de tempo al tempo, ŝi eliris por iom promeni en ina robo, profiti de la bela vetero kaj spiri la freŝan aeron en la kamparo. Ne malproksime de tiu submonta³ loĝejo, staris kaj ankoraŭ staras la kastelo de la Senjoro de Sasenaĝo. La kastelano estis bela viro, li ofte ĉevale ĉasis en la valo kun siaj kunuloj. Li ekvidis la nekonatan ĉarman virinon kaj aranĝis sin por foje renkonti ŝin. Li baldaŭ enamiĝis⁴ kaj ankaŭ la feino reciproke. Ili geedziĝis. Ŝi nur postulis, ke ĉiusabate⁵, ŝi malaperos kaj tiam li devos ne provi ekscii kial kaj kien ŝi malaperas. Li promesis ne perferi tiun misteran sekreton de sia edzino. Ili vivis feliĉaj, kredeble por ĉiam. Dek du filinoj naskiĝis. Iam, post multaj jaroj en paco kaj amo, la Senjoro subite ne plu rezistis al la emo malkovri la edzinan sekreton. Li spionis ŝin, okulumis⁶ tra la serur-truo de ŝia ĉambro kaj surprize li malkovris ŝin en la formo de sireno, duonvirino, duonfiŝo. Aĥ! La sorto estis rompita. Kolere, ŝi virine forkuris, sirene ĵetis sin en la torentan akvon kaj reiris al sia iama submonta loĝejo. Neniam oni revidis ŝin.

luj asertas, ke ŝi daŭre vivas en la groto. Foje, la torenta akvo ŝaŭmas. Certe, Meluzino purigas siajn tukojn.

Kiam vi vizitos la «Kuvojn», atente aŭskultu. Eble vi aŭdos ŝin.

Klod

Notoj:

1	multgaleria	kun multaj galerioj
2	piede de	je la piedo de
3	submonta	sub la monto
4	enamiĝis	<i>tomba amoureux</i>
5	ĉiusabate	dum ĉiuj sabatoj
6	okulumis	ĵetis rigardon



Heraldiko: El arĝento, kun Meluzino el la karno, harigita el lazuro, fiŝvostizita el gorĝo, kun spegulo kaj kombilo el oro, en sia bankuvo el sinoplo.

Grava stadio en komprenado de la naturo la darvinismo

En la jaro 1859, la brita naturscienculo Karlo Darvino (*Charles Darwin*, 1809 - 1882) publikigis libron sub la originala titolo *On the origin of species by means of natural selection, or the preservation of favoured races in the struggle for life* (Pri la origino de la specioj pere de natura selektado, aŭ la konservado de la favorataj rasoj en la batalo por vivo).

Tiam la doktrino pri la evoluado de la specioj ne estis nova. Fakte, la ideo estis kutima ĉe la helenoj kaj reaktualigita de pensistoj en la 18-a jarcento. En la jaro 1721, la franca verkisto kaj filozofo Karlo de Montesquieu (*Charles de Montesquieu*, 1689 - 1755) konceptis la eventualecon de la transformiĝo de la specioj. En la jaro 1753, la franca verkisto kaj filozofo Denizo Dideroto (*Denis Diderot*, 1713 - 1784) diris pri la eventuala estinteco de praulo komuna al ĉiuj vivuloj. En la jaro 1760, la sveda naturscienculo kaj verkisto Karlo de Lineo (*Carl von Linné*, 1707 - 1778) esprimis dubon



pri la neŝanĝebla karaktero de la organismoj. En la jaro 1785, la brita kemiisto kaj geologo Ĵameso Hutono (*James Hutton*, 1726 - 1797) kontestis la tradician biblian kronologion kaj la ideon pri universala diluvo. En la jaro 1794, la brita kuracisto kaj poeto Erasmo Darvino (*Erasmus Darwin*, 1731 - 1802) - avo de Karlo Darvino - prezentis la unuan teorion de la evoluismo. En la jaro 1809, la franca naturscienculo Johan-Baptisto de Lamarko (*Jean-Baptiste de Lamarck*, 1744 - 1829) defendis la evoluisman tezon. En la jaro 1830, la brita geologo Karlo Ljelo (*Charles Lyell*, 1797 - 1875) sciigis, ke la principoj de la geologio estas kontraŭaj al la teorio, kiu supozigas katastrofon dum la prahistorio.

Sur la kampo de la geologio Karlo Darvino akiris al si famon okaze de la publikigo de distra kaj instrua taglibro pri vojaĝo ĉirkaŭ la mondo. Li ĝuis ankaŭ aŭtoritaton pro 8 jaroj da studado de specio de konkuloj. Tamen nur malmulte da personoj sciis, ke la pensoj de Karlo Darvino estis science revoluciaj sur kampo de aktiveco, kiu malbone traktis la plej sentebajn religiajn kaj moralajn flankojn de la fierega, puritana kaj konvencia mondo de la periodo de regado de la brita reĝino Viktorino

(1837 - 1901): la demando pri la origino de la specioj.

Sufiĉe grava okazaĵo devigis Karlon Darvino rezigni sian daŭrigitan anonimecon. En la jaro 1858, li ricevis dokumenton pruvantan, ke la brita naturscienculo Alfredo Ruselo Valaso (*Alfred Russell Wallace*, 1823 - 1913), kiu vivis en Hindio, estis atinginta rezulton similan al la lia koncerne la originon de la specioj. Karlo Darvino timis la perspektivon estigi malindan diskuton pri la antaŭeco de la koncerna scienca teorio. Unuarangaj scienculoj aranĝis la aferon: la dokumento de Alfredo Ruselo Valaso kaj tiu, kiun skribis Karlo Darvino en la jaro 1844, estis legataj en la Linea Societo (anglalingve *Linnean Society*) de Londono. Tiuj dokumentoj naskis malmulte da reagoj en la skeptika etoso de tiu scienca societo. En la jaro 1859, Karlo Darvino sendis la tri unuajn ĉapitrojn de sia verko al eldonisto. 1250 ekzempleroj estis presitaj

kaj dua eldono estis tuj necesa. Lia libro levis ŝtormon da diskutoj, en kiuj la aŭtoro volis kiel eble malplej ofte entiri sin. Eminentaj scienculo deklaris, ke li trovis la verkon «tre pereiga». En gazeto estis skribite, ke la libro estis «atenco kontraŭ la religio kaj moraleco».

La subfosa karaktero de la verko ne kuŝis nur en tio, ke ĝi laŭvorte kontraŭdiris la Genezon. Fakte, la publiko sciis, ke oni povas interpreti en figura senco fragmentojn de la Biblio koncerne la Kreadon. La geologio montris, ke la formiĝo de la solida ŝelo de la terglobo postulis plurajn milionojn da jaroj kaj ne nur ses tagojn. Evidente la vorto «tago» devis kompreniĝi kiel simbolo de tre longedaŭra epoko. La teorio de la evoluado de la specioj ankaŭ povis ne tro malfacile esti aprobita kiel scienca interpretado de la jena dia ordo: «La Tero produkti vivulojn, ĉiu apartenanta al propra specio, dombestojn, reptiliojn kaj terbestojn». Fakte, la plej fortegaj kritikoj koncernis demandon, kiu ne troviĝis en la libro de Karlo Darvino, kaj kiun ĉi tiu lasta studos poste: la demandon pri la homo.

La teorio de Karlo Darvino evidente implicis la ideon de homaro devenanta el plej malsuperaj bestoj

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de teksto verkita sub la nomo John Burrow kaj troviĝanta en la 5-a

volumo de kolekto da libroj franclingve titolita *Les Grands Tournants de l'Histoire*; la koncerna volumo ricevis la titolon

Industrie et Révolutions. La franclingva versio estis eldonita de la firmao *Librairie Jules Tallandier* en la jaro 1970.

kaj ĝi rigardis la homon kiel kuzon aŭ posteulon de la simioj; tio estis rigardata kiel atenco kontraŭ la digno de la homa naturo. Tio subfosis la moralecon. La konvinko, ke ĉiu specio estis definitive fiksita sub la formo, kiun Dio havigis al ĝi, estis ankoraŭ la ortodokseco en la jaro 1859.

Por atingi la ideon pri evoluado de la specioj, Karlo Darvino devis liberiĝi de la influo de la regantaj pensoj kaj de sia kredo je la fikseco. Tio estis malfacila kaj li devis vojaĝi ĉirkaŭ la mondo, por komenci la pensan procezon, kiu kondukis lin al lia verko pri la origino de la specioj. Lia interesiĝo por la evoluado de la specioj unuafoje vekigis ĉirkaŭ 20 jarojn antaŭe okaze de restado sur la brita ŝipo *HMS Beagle*, kiu veturigis lin al Sud-Ameriko, Aŭstralio kaj ĉefe al Galapagoj inter la jaroj 1831 kaj 1836. Kiel naturscienculo li konstatis grandan similecon inter specioj de sama regiono kaj ankaŭ ilian similecon kun fosilioj, kio sugestas la ekziston de komuna origino. Leviĝis la jena demando: kial la specioj estus similaj ĝis tia grado, se ĉiu el ili rezultas el dia ununura kreado? Tio estis la deirpunkto de la pripensado, kiu kondukis Karlon Darvinon al la ideo pri evoluado. Tiu ideo interesis homojn en la 19-a jarcento, ĉar ĝi rilatis al la kredo je la progreso, kiu karakterizis tiun epokon, kaj ĝi prezentigis en pli scienca formo, ol la teorio de la apartaj kreoj, kondiĉe, ke ĝi estu kontentige pruvita pere de la fosilioj.

De la komenco de la 17-a jarcento, la fizikistoj kaj kemiistoj forlasis la ideon, ke la interveno de Dio estis la kaŭzo de la fizikaj fenomenoj, sed kiam la biologoj klarigis la originon de la vivaj specioj, tiam ili devis esprimi sin, laŭ diro de Karlo Darvino, «kvazaŭ la elementaj atomoj estis subite ricevintaj la ordonon konsistigi vivajn histojn». De alia flanko, la fosilia pruvo de la formoj de vivo en la sinsekvaj stadioj de la historio de la terglobo estis tro fragmenta, por atesti, ke la vivo disvolviĝis ekde plej simpla formo ĝis iom-post-iomaj pli malsimplaj. Tiu manko parte estis la kaŭzo, ke scienculoj restis skeptikaj pri la evoluado de la specioj.

Unu el la du grandaj realigoj de Karlo Darvino estis la unuafoja verŝajna klarigo pri la evoluado de la specioj. La dua koncernas la grandegan strebado kronitan de sukceso, kiu ebligis al li antaŭmalhelpi ĉiujn kontraŭargumentojn, kaj li subtenis sian teorion per konsiderinda nombro da observoj.

Karlo Darvino ŝuldis la malkovron de la mekanismo de la evoluado de la specioj al la verkoj de la brita ekonomikisto Tomaso Roberto Maltuso (*Thomas Robert Malthus*, 1766 - 1834). Ĉi tiu lasta insistis pri la kontraŭeco inter la daŭra inklino de la populacioj kreski kaj la lima aspekto de iliaj resursoj.

Karlo Darvino aplikis tiun teorion al la demando pri la specioj. La populacioj povas kreski nur kun la kondiĉo, ke iliaj ebloj nutriĝi estu sufiĉaj. La individuoj, kiuj plej bone adaptiĝas al sia medio, transvivas kaj postlasas idojn. Tiu koncepto nomiĝis leĝo pri la natura selektado. De alia flanko, la formiĝo de novaj specioj estis atribuita al apero - konstatita nur okaze de observoj, ĉar ĝia kaŭzo restis mistera - de ŝajne okazaj ŝanĝiĝoj en la generacioj. Luj el tiuj ŝanĝiĝoj povus doni avantaĝon al siaj favoratoj, kiuj estus aŭtomate selektitaj de la naturo por transvivo kaj reprodukto.

La koncepto pri la natura selektado estis la plej granda kontribuajo de Karlo

adaptiĝo al medio, ol la konkurantoj. La celeco, kiun la homo proprigas al si, ne povas esti projekciata en la naturon, kaj la homo mem aspektas kiel la okaza produkto de blinda naturo, en kiu ĝi batalis kontraŭ bestoj, por daŭrigi sian ekzistadon.

La darvinismo kaj dogmismo fariĝis malfacile akordigeblaj. La tiama oksforda episkopo furioze atakis la darvinismon, dum teologoj rapide adaptiĝis al la koncerna teorio. La brita romanisto kaj historiisto Karlo Kingsleo (*Charles Kingsley*, 1819 - 1875) skribis la jenon al Karlo Darvino: «Mi iom post iom lernis pensi, ke tutsame nobla estas koncepto pri Dio tiom kredi, ke Ĝi estis kreinta primarajn vivformojn kapablajn kreski per si mem, kiom kredi, ke Ĝi estis devigata interveni, por plenumi la vojojn, kiujn Ĝi mem estigis». Humanistoj entuziasmiĝis al la ideo, ke, en la homa kazo kaj spite la hazardon, la evoluado finatingis kreitaĵojn, kiu kapablas intence kontroli sian medion kaj la sorton de sia specio.

Konsiderante la darvinan teorion, oni ne plu povis havi la saman senton pri komuneco kun la naturo, ol kiam oni rigardis sian sorton kiel diece atribuitan kaj Adamon kiel apenaŭ pli malproksiman, ol estas praavo. En la 20-a jarcento, doktrinoj kiel la ekzistadismo kaj la pozitivismo antaŭsupozigis la necelecon de la fizika mondo en grado, kiu estis preskaŭ nepensebla en la komenco de la 19-a.

La darvina teorio estis transigata al la socia vivo: - la milito estus biologia neceso, - la leĝo de la konkurado pri negocaj aferoj estus la «postestado de ĝia plej alta grado de intenseco». La darvinaj ideoj estis ankaŭ uzataj kiel almiksaĵo al la hitleraj teorioj de rasa supereco. Fakte, la socioj mem estigas selektadojn, kiuj tute diferencas de tiuj rezultantaj el la naturo; ekzemple, milito ŝajnas malaperigi rason, anstataŭ plibonigi ĝin.

Karlo Darvino ne vortigis tiajn uzojn de sia teorio, sed li estus probable aprobinta la disvolviĝon de la genetiko, kiu parte klarigas la kaŭzojn de la mutacioj. De alia flanko, la moderna biologio baziĝas tiel same sur la mendela genetiko, kiel sur la natura evoluado prezentita de Karlo Darvino.

Jean Selle

Tio, kion Darvino ne povis antaŭvidi...

Montru al mi per la fingro la novan specion de fungoj subite aperintan en la jaro 1945



Darvino al la evoluisma teorio, sed ĝi estis ankaŭ la plej vigla atako kontraŭ la tradiciaj konceptoj pri Dio kaj la naturo pro la fakto, ke la homo mem devas neeviteble trovi sian originon el inter la bestoj.

Karlo Darvino vidis neniun celecon en la ĝenerala progreso de la formoj de la vivo al malsimpleco kaj pli granda specialiĝo. Unu el liaj notoj estas jena: «Neniam uzi la vortojn supera kaj malsupera». La naturo havas neniun celon. La natura selektado koncernas ion ajn, kiu profitas de pli bona

1-a kongresa bulteno

84-a SAT KONGRESO

SARAJEVO 30.07. – 06.08.2011.

Bonvenon al la KONGRESURBO

- la ĉefurbo de la ŝtato Bosnio kaj Hercegovino
- la urbo de KULTURO kie renkontiĝas la Oriento kaj la Okcidento
- la urbo de RELIGIO kie kunekzistas je distanco de nur cent metroj ĉefpreĝejoj de kvar grandaj mondaj religioj – « la eŭropa Jeruzalemo »
- la urbo de moderna eŭropa HISTORIO en kiu la atenco en 1914 komencigis la unuan mondmiliton kaj la sieĝo en 1995 finis tragikan flankon de la 20-a jarcento
- la urbo de TURISMO kun multaj vizitindaj monumentoj, tre pitoreska malnova urbo kaj la bela ĉirkaŭaĵo.

KONGRESKOTIZOJ

Ĝis :	31.12 2010	28.02 2011	30.04 2011	30.06 2011	Poste
SAT-membro	40 €	45 €	50 €	55 €	60 €
SAT-geedzoj	60 €	70 €	80 €	85 €	90 €
SAT junulo ĝis 25 j.	15 €	20 €	25 €	30 €	35 €
Nemembro de SAT	50 €	55 €	60 €	65 €	70 €
Junula nemembro de SAT	20 €	25 €	30 €	35 €	40 €

- Infanoj ĝis 15 jaroj ne pagas kotizon
- Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono
- La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn kaj aliajn aparte pagendajn aferojn, ankaŭ nenian asekuron
- Aliĝilon sen pago de la kotizo la OKK ne traktos

PAGEBLECOJ

- * Poŝtkonto : SAT n° 1234-22 K, Paris.
- * IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064 BIC : PSSTFRPPPAR
- * Savez za esperanto BiH : IBAN BA39 3389002206352698, Unicredit bank d.d.
- SWIFT code:UNCRBA22A
- * Konto de SAT ĉe UEA : satx-sal
- * Konto de ELBkH ĉe UEA : elbh-j, kun indiko «SAT-Kongreso 2011»
- Aliĝilo estas elŝutebla pdf-formate sur tiu ĉi paĝo

ADRESOJ DE LA ORGANIZA KONGRESA KOMITATO

Poŝtadreso :
84-a SAT-KONGRESO, Pf. 452, Kralja Tvrtka 19
BA-71000 SARAJEVO
Bosnio kaj Hercegovino
Telefono : +387 33 205 487 Telefakso : +387 33 205 487

Retadreso:

www.esperanto.ba
www.satesperanto.org
info ĉe esperanto.ba
satkongreso ĉe esperanto.ba
programkontribuantoj : satprogramo ĉe esperanto.ba
fetah.zvirac ĉe energoinvest.com
senad.colic ĉe esperanto.ba



ksenofobio

Fetoraĉas !

Post la prelego rasista ripetita de la sarkozia registaro ĉi-somere, post la abundaj malkonstruoj de tendumejoj kaj sensaciaj forpeloj, kun samtempa krimigo de la tuta komunumo de la Romaoj, kiu estis egaligita kun la tuta enmigrado kaj deliktado, oni eĉ aŭdis pri «malnacionigo»... Kontraŭe al tio, kuniĝis kolektivoj kontraŭ ŝtata ksenofobio, kiu alvokas multoblighon en ĉiuj urboj kaj urbetoj...

Neakceptindas ke virtaj sofismoj povas kamufli la daŭrigon de instituciaj rasistaj aranĝoj. Tiucele, la kolektivoj kontraŭ ŝtata ksenofobio ekde nun eldiras du denuncojn, kaj postulas, ke tiuj abomenaĵoj ĉesu kiel eble plej rapide :

• Abolicion tujan de la libreto por cirkulado !

Ekde 1912, do baldaŭ jam de unu jarcento ekzistas en „Franca Respubliko“ subcivitana statuso por la „anoj de la vojaĝanta gento“, truditaj prezentiĝi ĉe la polico ĉiun trian monaton, sub minaco de unujara malliberigo. Por ĝui sian civitanajn rajtojn –kiel la rajto voĉdoni, oni devas ligiĝi dum almenaŭ tri jaroj al urba komunumo, se la urbestro kaj la Prefekto tion permesas !

• Vilaĝoj por integriĝo = Internigejoj

Ekde 2006, en Seine-Saint-Denis, lokiĝas „vilaĝoj por integriĝo“, france nomitaj M.O.U.S (Maîtrise d'œuvre Urbaine et Sociale, urba kaj socia kunordigado), en kiuj loĝas Romaoj el Rumanio kaj Bulgario. 75% de la buĝeto de tiuj detenejoj estas dediĉita... al la gardado kaj la „sekureco“, t.e. noktogardistoj kun hundoj, kameraoj, dratretoj. Povas esti malpermesite eliri vespere... Estas malpermesite akcepti vizitantojn ! Necesas demandi permeson al la Prefekto por eniri !

Necesas tuj malaperigi diskriminaciojn instituciajn.

Kolektivoj Kontraŭ Ksenofobio
contrelaxenophobie@gmail.com

Blogo : <http://contrelaxenophobie.wordpress.com>
Fonto <http://contrelaxenophobie.wordpress.com/2010/09/03/ca-pue/>



Tradukis Jomo Blanszezo

Kamaradoj el la Pariza SAT-rondo ĉeestis la manifestacion kaj disdonis 2000 ekzemplerojn de tiu teksto dulingve (fr/eo).

Ni esperas ke la bildo elektita de KKK (ĉi kune) neerarigis la ĝisostajn kontraŭtabakismulojn ! ;-)

Manifestacio kontraŭ ksenofobio

Opinio de partopreninto

Kiam mi naskiĝis kaj kiel knabo kreskis en la urbo Rijeko, mia patrino ĉiam instruis al mi ke mi devas nomi knabojn aŭ knabinojn laŭ ilia nomo aŭ familia nomo. Neniam laŭ ilia religia aŭ nacia aparteno. Kompreneble mia patrino naskiĝis en 1920 kaj travivis diktaturan reĝimon de reĝa Jugoslavio kaj faŝistan kaj naciistan reĝimon de tiama kroata registaro kiun gvidis Ante' Pavelić'. Tra la interfrataj disputoj, bataloj kaj murdoj, ĝis la etna purigado kiu daŭras ankoraŭ nuntempe. Ĝuste nun kiam en Hago estas juĝataj krimuloj de eks-Jugoslavio, nuntempaj eŭropaj registaroj

Arieĝio (09)

Turneo de Mirejo Grosjean

Preterpasante urbetojn (*Mirepoix, Foix kaj Pamiers*), Mirejo kontaktiĝis kun lokaj Esperantoparolantoj kaj kelkaj simpatiantoj. Mirejo informis nin pri siaj porvarbadaj vojaĝoj, pri reagoj en internaciaj medioj koncerne Esperanton ; ni memoru ke ŝi estas inter alie, nia UNa delegito en Ĝenevo.

Ankaŭ, Mirejo tre ŝatis viziton en lernejo «*Calendreta*» de *Pamiers* kaj tiel firmigis niajn ligojn kun okcitanaj parolantoj. (*Calendreta* : tie oni instruas la okcitanan lingvon kaj per la okcitan lingvo)

Renato

Aldonindas ke Mirejo estas ankaŭ loka peranto de SAT-Amikaro por Svisio.

Redakcio



Lakurnovo (La Courneuve 93)

La Homara Festo

Denove ĉi jare 600 000 vizitantoj havis okazon vidi la vojkruciĝe taŭg-lokitan Esperanto-budon, en kiu seninterrompe deĵoradis entute kvindek da esperantistoj dum tri tagoj, k dum kiu 800 subskriboj al petskribo favore al Eo ĉe bakalaŭra ekzameno estis rikoltitaj.



Vendomo, Lunajo (41)

«*Espéranto en Vendomois*» (Esperanto en Vendomio) partoprenis en 2 sinsekvaj lokaj manifestacioj: la 29an de aŭgusto en Lunajo (*Lunay*) okaze de la jara vilaĝa festo kaj la 04an de septembro en Vendomo (*Vendôme*) en la «*journee des associations*». De pli ol 2 jaroj Cédric kaj Alice el Ĉatoruso (*Châteauroux*) biciklas tra Eŭropo, Azio kaj Afriko, uzante Esperanton. En la budo, paneloj montras klarigojn pri ilia vojiro kaj fotojn de renkontiĝoj kun esperantistoj en Rusio, Irano, Nepalo, Vjetnamio, Ĉinio, Japanio....La deĵorantoj respondis al demandoj pri la lingvo, starigitaj de la vizitantoj. Surprizon ili havis kiam viro diris, ke filino lia vojaĝis al Kubo, por partopreni UK-on. Eĉ trarigardante la diversajn revuojn surtablitajn, li rimarkis artikolon de ŝi, en revuo de Jefe 2006.



Ĵurnalisto kolektis informojn pri la lingvo kaj nia klubo, por aperigi artikolon en sia gazeto.

Kursoj en Lunajo rekomenciĝos vendredon 01an de oktobro informoj je 02 54 72 15 11.

Marc Noulin

Esperantistoj aktivas

havas komunan malamikon: romaoj-ciganoj. Tio estas atesto ke ankoraŭ ĝis nun, tra ĉiuj militoj kiuj okazis antaŭ la Unua kaj post la Dua Mondmilito, ni nenion lernis kaj komprenis de historio?... Kial?... Koruptado, kiu ekzistas kaj frapas la plej grandajn entreprenojn kaj ministrojn. Pli interese estas forpuŝi kaj altiri amaskomunikilojn al kompatindaj homoj ol ke la justeco kaj historia vero aperu. Tiuj, kiuj profitis riĉiĝante sur la dorso de aliaj dum jardekoj devas iam repagi la kontojn. Mi pro tio partoprenis al la manifestacio la 4an de septembro kaj portis panelon sur kiu estis skribite: «Ni ĉiuj estas ciganoj» kaj «Sufiĉas kun la etna purigado».

Vjeko Markovo

Parizo (75)



konkurso

Nova emblemo por SAT-Amikaro

Dum la kongreso ni decidis daŭrigi la akcepton de proponoj ĝis la somerofino, k la fina voĉdono okazos pere de la referendumo.

Finiĝis somero, kaj jen la lasta kontribuajo:

M



Konklude, dek ses partoprenantoj proponis entute pli ol kvindek da bildoj, inter kiuj multaj tre belas, sed ankaŭ multaj ne komplete respektas la postulatajn ecojn. Laŭ la regulo anoncita, la komitato elektos la dek plej trafajn - precipe laŭ la kongrueco kun la ĵus aluditaj ecoj - kiuj aperos en la onta referendumilo cele al voĉdonado.

La aperigo de la proponoj en La Sago celis instigi komentojn, kio ne okazis. Ĉu la temo ne interesis? Ĉu la legantoj ne sentas sin kompetentaj por reagi? Au ĉu tutsimple mankas kutimo dialogi kun la gazeto?

Redakcio

Roman'-ĉe-lzero (Roman-sur-Isère 26)

Kloŝmerlo en traduko

La grupo de Roman' entreprenis tradukon de Kloŝmerlo antaŭ pluraj jaroj, po unu-du paĝojn ĉiusemajne. Oni jam transpasis la duonon de la teksto...

Kloŝmerlo estas franca satira romano de Gabriel Chevallier, publikigita en 1934, kiu ricevis sukceson senprokrastan kaj daŭran, kun preskvanto je pluraj milionoj da ekzempleroj kaj tradukoj en dudek ses lingvojn. Ĝi adaptiĝis en kino kaj televido. La loknomo, inventita de Gabriel Chevallier, hodiaŭ eniĝis en la ordinaran lingvon kaj estas uzata por indiki vilaĝon disŝiritan de burleskaj kvereloj.

Alia signo de sukceso: tiu ĝoja satiro estas tiel bonvena ke pluraj vilaĝoj postulas la honoron, ke ili estis la modelo de Kloŝmerlo en Bojolezo... honoro kiu estis aljuĝita al la franca komunumo Vaŭso-

en-Bojolezo, kie Gabriel Chevallier mem inaŭguris, en Oktobro 1956, la plakon kiu atribuas lian nomon al la eksa grandplaco.



G.R.

La supran prezentan tekston La Sago enirigos en Vikipedion ilustrita de la «imaga blazono» de Kloŝmerlo kun ties publika urinejo, deirpunkto de la kloŝmerlaj disputoj, kaj kun sonorilo kaj merloj, kiuj rebuse bildigas la nomon (Sonorilo = Cloche en la franca, prononciĝas Kloŝ)

Redakcio

